

Jaro IX. N-o 3.

MONATA

Marto 1926.

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kč 20.—; fremdlando Kč 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271.



BRATISLAVA

LA URBO DE LA III. ĈEĤOSLOVAKA KONGRESO.

(Generala vidaĵo, dekstre la kvarturo kastelo.)

LITERATURO

MEREJKOVSKIJ:

PANTEONO

Mi, vojaĝanto de l' nordo malĝoja al vi, Olimpanoj
 En Panteono mi jen, dolĉe tremanta pro tim'.
 Homa spirito nur tie ĉi povas kun dioj egali.
 Kie do estas Olimp', Roma tutmonda Olimp' ?
 Nun estas ĉie forgeso : regas nun en Panteono
 por Olimpanoj fremdul' - Dio de nia epok',
 Jen krucumita, najlita, en krono p unela li estas :
 En la vizaĝo turment', mort' en humila okul'.
 Scias mi, dioj feliĉaj, turmento por vi malaminda,
 Vi vin deturnis de Li, kovris l'okulojn en tim',
 Vi forflugadas, ho klaraj figuroj Olimpaj.
 Haltu, ho petas mi vin, vidu, li estas la frat',
 Estas li Dio, genuojn mi antaŭ li klinas,
 Ĉar la turmenton ĝis mort' prenis bonulo pro mi.
 Kredas mi vin, ho Sinjoro, lasu forgesi la vivon,
 Lasu al mi pro la am' morti nur kune kun Vi.
 Mi ekturnis min : jen suna ĉiel' malproksima.
 Klare radias la lum' en la pagana preĝej'.
 En la ĉiela lazur' morto, turmento malestas.
 Amas ni lumon de l' sun', vivo — plej kara donac' !
 Kie do estas vi, ver' ? En morto, en am' aŭ turmento,
 aŭ en la tera belec', via, olimpa diar' ?
 Kiel en tiu preĝej', en homa animo disputas
 ĝojo eterna kaj viv', mort' kaj eterna mister'.

Trad. V. Vozdviĵenskij (Odesa).

FERD. PÍSECKÝ:

KREO DE LA HOMO

Legendo

La mondo estis kreita, sed estis sen loĝantoj.

Alte en la nuboj restadis Dio kaj rigardis enpenseme sur la teron. Li ekpensis : „La floroj kreskas, multiĝas, odoras, donas fruktojn, la bestoj moviĝas en aero, sur tero kaj ankaŭ en akvo, sed ne ekzistas surtere la estaĵo, kiu estus kapabla sekvi min en krea laboraĵo, realigadi pensojn per faroj, ŝati eksteran belecon kaj internan valoron de kreitaj objektoj kaj estaĵoj, solvi la problemojn de la vivo, ami kaj ne timi la morton.“

Longe pripensis Dio, ĝis li fine ekridetis kaj de lia ekrideto vastiĝis tra la tuta naturo ia varmiga lumo, la birdoj ekkantis la plej belajn kantojn, la bestaro blekis pro superfluo da brustpenetranta ĝojo, la floroj

komencis bonodori per la plej dolĉa spiro.

Dio malsupreniĝis sur la teron, tremantan pro nerekonita feliĉego ĝis al sia brulvarmega interno, kiu ŝaŭmleviĝis kaj erupciis per la faŭkoj de multnombraj vulkanoj la plej glorajn artfajraĵojn.

La ĉiopova mano de Kreinto prenis la pecon de bonodora, malpeza argilo de sur la brusto de patrino tero, trapenetrita per feliĉega antaŭsento, kaj komencis knedi la korpon de la unua homo.

Sur la proksima roko sidis diablo kaj scivoleme observis la dian laboraĵon.

La figuro kreskanta pere de la ĉiopova mano antaŭsentigis la diablon, ke tiu-ĉi kreitaĵo estos la glorkrono de la kreado, la majstra verko de Dio, kiu en ĝi kuncen-trigos ĉion plej bonan, kion li posedas.

Sekve de tio la diablo estis atakita per arda deziro uzurpi tiun ĉi genian kreaĵon aŭ ĝin almenaŭ difekti.

Dio en krea ekstazo ne rimarkis, ke

la diablo malsupreniĝis proksime ĉe li, kaj daŭrigis sian laboron. En la momento, kiam li estis metanta la koron en bruston de la homo, la diablo tiun ekkraĉis.

Dio malsereniĝis, sciante, ke la sen-signifa guto de la diabla salivo ŝanĝiĝos en sango de la homo en venenon kaj li volis forlasi sian laboraĵon.

Sed tuj poste lia vizaĝo ree sereniĝis. Li ekrigardis kun malpeza mokrida ridiganta diablon kaj diris: „Ni ekvidu, kiu el ni estas pli potenca.“

Li finis sian laboron kaj enspiris al la homo animon, en kiun ankaŭ transiris la veneno el la salivo de la diablo, sed en kiu ekflamis samtempe la rekono de la bono kaj malbono.

Kaj tiel depost la tago, kiam la unua homo surpaŝis la teron, vivas en lia animo Dio kaj diablo, la bono kaj malbono, sed kiam la malbono plimultiĝas kvazaŭ malbona herbo, la rekono de bono brulas same kiel helbrila stelo, en kiu respeguliĝas la afabla, belega rigardo de dia okulo. Kaj la homo ĉiam revenas al ĝi, por ĉerpi el ĝia lumo konsolon, kuraĝigon, forton, al kiu ĉio estas ebla, al kiu nenio estas teruro, kiu kondukas la homon tra la dor-noplena, ofte per sango kovrita vojo pli alten al tiu, kiu lin kreis.

Kun permeso de la aŭtoro tradukis el ĉeĥa lingvo Jan Nosek (Skřivany).

MIROSLAV RUTTE:

SCIENCA UTOPIO EN LA MODERNA ĈEĤA ROMANO.

Okaze de la eldono de esperanta traduko de la fama verko R. U. R. de Karel Čapek, ni publikigas el la suprenomita artikolo la parton, kiu rilatas al RUK.

En la ĉeĥa literaturo, la scienca utopio aperas nur post la fino de la milito.

Sed filozofian kaj sociologian karakteron la scienca utopio ĉe ni ricevas nur en la kolektiva dramo de Karel Čapek: „R. U. R.“ (Rossum's Universal Robots). Fiziologo Rossum, kies nomo* klare montras, ke celo de la aŭtoro estas ĉefe la kritiko de la troa racionalismo, konstruas, en 1932 post longa

*La nomo Rossum memorigas pri ĉeĥa vorto *rozum* (racio). La vortludon en la titolo de la libro konservis ankaŭ la germana traduko: Werstands Un. Rob. (Verstand = racio).

eksperimentado, artefaritan protoplasmon kaj tiel enmetas sin aŭdace en la krea procedon de la naturo: li komencas organizi la vivan materion pli simple, pli celscie kaj pli rapide ol la naturo mem. Estante obstina materialisto, li volas detronigi dion, kaj ĉiun sian penon li dediĉas al la fabri kado de perfekta, artefarita homo.

Lia nevo, moderna teknikisto, profitigas la esplorojn de sia onklo el tute diferenca, industria vidpunkto. Li ne volas fabriki multekostan neutilan homon, sed roboton, kiu havus kiel eble plej simplan kaj fidindan konstruon kaj precizan funkciadon kaj kiun oni povus fabriki malmultekoste kaj serie en uzinoj. Ekirante de la konvinko, ke „nafta motoro ne havu kvanton“, li senigas siajn robotojn de ĉio, kio estas senbezona ĉe la vivanta laboranta maŝino: sento, seksorganoj, sento por beleco kaj doloro, kaj animo. La fabrikaĵo malkariĝas per tio kaj baldaŭ plenplenigas la tutan mondon. Ĉie la fabrikejoj plenigas per la robotoj, malmultiĝas la prezoj de varoj, venas la ĝenerala bonstato. La robotoj faras la homon libera de la materio kaj definitive nuligas la socialan servutecon. La teknikistoj opinias, ke nun komencas la ĝenerala paradizo, ke la homo, liberigita el la necesa laboro por savi sian ekziston, povos dediĉi sin sole al la aferoj de spirito.

Sed la naturo, kies ordo estis difektita de la homo, preparas sian venĝon: la senaga homaro fariĝas nekapabla naski kaj formortas, kaj la robotoj, en kies maŝina mekanismo ĉiam laboris io ne elkalkulebla, subite vekiĝas al la klasa konscio. Ĝi estas la ribelo de la vekigitaj maŝinoj, la revolucio de duonhomoj, kiuj deklaras militon kontraŭ la homo kaj senkompatate elmurdas lin en ĉiuj partoj de la Tero.

Sed nun venas la dua katastrofo: la kemia recepto por fabriki la robotojn estis forbruligita de la homoj, la robotoj ne kapablas fabriki sin mem, kaj tiel la mondon minacas la fino de ĉia vivo. Sed tiam la naturo mem savas la vivon, detruitan de la homoj: en du robotoj, Helena kaj Primus, speciale zorge fabrikitaj, subite aperas la sento, kiun la neceso mem evoluigis en la delikata mekanismo. Kaj kun la amo venas ankaŭ la seksaj funkcioj. La vivo estas savita: ĝi ne mortas. La utopia tragedio finas per laŭdkanto al la vivo, kiu „ree komencos nuda kaj eta, kaj alradikiĝos en la dezerto“.

Trad. Rud. Hromada.



KONGRESEJO

Urbdomo de Bratislava

EL ĈEĤOSLOVAKIO

Se iu el tiuj ĉi koncizaj notoj speciale interesas iun el niaj eksterlandaj legantoj, la redakcio povas peri detalan informon.

— Pro la nebleco interkonsentigi partiojn koaliciajn en diversaj aferoj, ekz. gren-doganoj, la registaro prezentis eksigopeton, kaj la prezidanto nomis novan ministraron, kies membroj estas ne parlamentanoj, sed altrangaj oficistoj. Ĉefministro kaj min. de interno: Dr. Jos. Černý; eksterlando: Dr. Beneš; financoj: Dr. Engliš; instruado: Prof. Dr. J. Krčmář; justeco kaj provizado: Dr. Jiří Hausmann; komerco Dr. Fr. Peroutka; fervojoj Dr. Jan Říha; publikaj laboroj: Ing. Václav Roubík; terkulturo kaj unuigo de leĝaro: Dr. Juraj Slávik; nacia defendo: generalo Jan Syrový; sociala zorgo kaj higieno: Dr. Josef Schiezl; poŝtoj: Dr. Max. Fatka; slovakaj aferoj: Dr. Jos. Kállay. Entute 13 ministroj anstataŭ la ĝisnunaj 17.

— Sabate la 27. Marto en ĉiuj ĉs. lernejoj esis dediĉata unu duonhoro al klarigo pri pacaj tendencoj, memore al Jan Amos Komenský.

— En universitato de Praha estis promociita je doktoro de jurscienco S-ino M. Janková el Zatec, kiu jam estas doktoro de filozofio. En nia lando estas la unua fojo, ke virino atingis duoblan doktorecon. — Siatempe la unua virino ricevinta gradon de doktoro de jurscienco estis F-ino Anđela Kozáková, membro de E. K. Praha.

— Al la Sokolaj tagoj, komence de julio, venos gimnastoj per 110 vagonaroj el la tuta respubliko.

— *Pilsena biero*, fabrikata en okcidentbohema urbo Plzeň, denove akiras iom post iom la eksterlandajn merkatojn, kiujn ĝi perdis dum la milito. Laŭ la ciferoj publikigitaj de la kvar ĉefaj bierfarejoj en Plzeň montriĝas dum la lastaj jaroj konstanta kresko en la eksporto de la fama biero.

— Unua ĉeĥoslovaka *fabriko de poŝaj kaj braĉeletaj horloĝoj* estis ĵus finkonstruita en Praha. Ĝis nun la maŝinoj de ĉi tiaj horloĝoj estis ĉiuj importitaj.

— La 4. Februaro estis eldonita registara dekreto pri praktikado de la konstitucia leĝa juro en ĈSR.

— Ankoraŭ kvaronmiliono da loĝantoj mankas, por ke Praha havu da ili *unu milionon*. Interese estas sekvi la kreskon de la ĉeĥoslovaka ĉefurbo. En la jaro 1843 havis Praha 146.419 loĝantojn, en 1850 estis la suma nombro 157.253. La dua centmilo estis atingita en 1857, en 1869 estis en Praha 239.700 personoj. Je dekdu jaroj pli poste en 1881, estis la tria centmilo atingita, en 1890 havis Praha jam 397.266 loĝantojn, post dek jaroj pli ol duonmilionon, 514.349. Lastfoje antaŭ la milito, en jaro 1910, oni kalkulis 616.651 loĝantojn, post la milito en 1921 estis trovita kresko de 60.000, ĉar tiam estis 676.651 loĝantoj. Laŭ la ciferoj anoncitaj de la ŝtata Statistika oficejo la nombro de 750.000 estis konstatita en aŭgusto 1925.

Esperantský radio-kurs v Brně.

Dle právě došlé zprávy, Radiojournál v Brně bude od dubna vždy ve středu vysílati esperantský kurs, řízený panem Josefem Bednářem, ředitelem Obchodní školy.

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

NUMERO 9.

MARTO 1926.

Kial vi ne ankoraŭ aliĝis al ĈAE?

Kial vi hezitas tion fari?

Ĉu vi jam aliĝis al la kongreso en Bratislava?

Detaloj pri la membreco kaj kongreso en la lastaj numeroj!

Tiuj, kiuj ne ricevis aliĝilon en la lasta numero, bv. ĝin postuli ĉe Asocio.

VII. JARKUNVENO DE ĈAE

Ĝi okazis la 28. Februaro dimanĉe en Praha, kafejo Edison.

Partoprenis 60 persono el 13 lokoj kun 201 voĉoj. La prez., S-ro Eiselt malfermas la kunsidon je la 9a matene, salutas ĉiujn, kaj per koncizaj vortoj donas bildon pri la agado de ĈAE dum 1925, dankante pro la senlaca laboro de la ĝen. sekr. Hromada, de S-ro Ginz, post kies rezigno ni ĝis nun ne havas kompenson, de S-ro Novák, kasisto.

La kunveno konsentas, ke la protokolo de la lasta jarkunveno ne estu legita, ĉar ĝi estis publikita en Progreso, resp. Bulteno.

S-ro Hromada prezentas detalan raporton pri 1925, kiu daŭris 1½ horojn kaj kiu estis akceptita kun speciala danko al S-ro Hromada.

Al la raporto S-ro Pitlík rimarkigas, ke en la Teknika lernejo li, kiel lektoro, havas 8 lernantojn (3 studentoj, 5 nestudentoj).

S-ro Hromada legas la raporton de la Scienca Sekcio, senditan de ĝia estro, D-ro Kamaryt. Danke akceptita. (Aperos en 10. n-ro en Bulteno.)

S-ro Novák prezentan la kasistan raporton (aperos ankaŭ en la venonta n-ro). S-ro Votrubeč, membro de Kontrola komisiono de ĈAE, revizinte la kontojn, trovis ilin en ordo kaj proponas la senŝarĝigon de la kasisto kaj la komitato. Akceptita kun esprimoj de danko al S-ro Novák.

La buĝeto por 1926, laŭlegita de la kasisto estis aprobata. Ĝi antaŭvidas elspezojn Kč 17.000, kiuj supozas aliĝon de 1000 membroj.

Por la nova komitato estis elektitaj: Bergman Ústí n. O., Bouška Praha, Eiselt Praha, Hromada Praha, Dr. Kamaryt Bratislava, S-ino Keyzlarová Červ. Kostelec, Kubala Sl. Ostrava, Kudela Olomouc, Novák Praha, Pitlík Praha, Schmidt Praha. Kiel vickomitatoj: Dobeš Praha, Janoušek Praha, Malík Přerov, Novák Plzeň.

Membroj de Kontrola komisiono: Bujarek Nové Zámky, Friedrich Košice, Votrubeč kaj Weisskopf Praha. Vicmembroj: F-ino Holancová Vyškov, Růžička Holešov, Zöllner Brno.

Liberaj proponoj. S-ro Pitlík sendis 9 proponojn. La kvaran li nuligis. La prezidanto legas la unuan: Pri regiona organizo. La proponon subtenas del. de E. K. Ústí n. O. Post nelonga debato, kun konsento de S-ro Pitlík la 8 proponoj estas transdonitaj al la nova komitato.

S-ro Benda insistas pri esp-a disaŭdigado, S-ro Pitlík informas, ke la ĝisnunaj intervenoj estis sen rezultato kaj parolas pri diversaj eblecoj sur tiu ĉi kampo. Je la 13 horo la kunveno estis finita.

Protokolis A. Tarantíková.
Stenografis V. Ehtner.

RUD. HROMADA:

ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO EN 1925

(Laŭ la raporto prezentita al la ĝenerala kunveno de ĈAE, la 28. Februaro 1926, kaj tie per ĉiuj voĉoj akceptita.)

(Daŭrigo.)

Propagando.

Gazetara. La propagando per nacilingvaj gazetoj estis la plej bone zorgata parto de la propagando ĝenerale. Kiel ni raportis jam la pasintan jaron, la porgazeta materialo estis disponigata al niaj kunlaborantoj ne plu per cirkuleroj, sed per Progreso, en speciala fako de ĉeĥlingvaj informoj El esperanta movado, redaktata de S-ro Ginz. Ĉar neniam niaj kunlaborantoj precize sendadis al ni la dokumentajn eltranĉaĵojn, ni abonis ĉe Mezeŭropa Eltranĉaĵa Oficejo, kiu liveras al ni artikolojn ne nur pri esperanto, sed pri ĉio, kio rilatas lingvon internacian.

Kvankam ni konstatis, ke ankaŭ per tiu ĉi maniero ni ne ricevas ĉion, tamen la aranĝo estas ĝenerale kontentiga.

Se ni kalkulas sole ĉeĥlingvajn gazetojn, ni havas pruvojn, ke de la 1. II. ĝis 31. XII. almenaŭ en 151 gazetoj de 44 urboj aperis 760 informoj, en kiuj ĉ. 740 estas pri esperanto, 20 pri ido kaj aliaj. Kvankam ni ne havis tempon por fari detalan statistikon, laŭ la ĉiutage venanta materialo ni vidis, ke la granda parto devenas de la Progreso. Tion mi ne opinias tre kontentiga, ĉar mi pli ŝatus vidi memstaran laboron de aliaj kapablaj membroj. Memstaraj artikoloj aperis en la plej granda kvanto kaj tre bona kvalito en Moravsko-slezský dennik, kie ĉiusemajnan rubrikon, almenaŭ unu kolono de granda formato, lerte gvidas D-ro Parma el Mor. Ostrava. Tre valoran helpon al nia afero donis la etika semajna gazeto, grandnombre disvastigita, *Nový Lid* (Nova homaro) en Brno, kie S-ro O. Petr gvidis kurson kaj nun publikigas esp. tekstojn kaj informojn.

Longaj artikoloj pri esperanto aperis en ĝendarma gazeto *Bratrství*, dank'al S-ro *Vávrovský*. Plej regule kaj sukcese zorgas pri gazetara servo E. K. Ústí n. O. Pri la soc. dem. gazeto *Nová Doba* en Plzeň zorgas vigle LLE.

La plej multe da informoj (ĉeĥaj) aperis en Praha (234, Brno 81, Mor. Ostrava 66, Plzeň 63, Olomouc 44, Ústí n. O. 27, Bratislava 24, Košice 19, Budějovice 18, Hradec Králové 15, Jičín 13, Chrudim, Kolín, Liberec, Náchod po 12, Přerov, Klatovy po 11, Benešov, Jaroměř po 10. La ceteraj lokoj havas malpli ol 10 informojn, kvankam inter ili troviĝas lokoj gravaj.

Al la cifero 760 informoj en ĉeĥaj gazetoj de ĈSR estas aldonotaj 62 informoj en ĉeĥaj gazetoj, aperantaj ekster ĈSR: Wien 41, Cleveland (USA) 17, Chicago 2, Daruvar (SHS) 2, la sumo de ĉiuj $760 + 62 = 822$.

Tabelo montranta, kiom da informoj aperis en ĉiu monato, aspektas jene:

Januaro (ne jam nekontrolita)	
Februaro	29
Marto	46
Aprilo	76
Majo	82
Junio	49
Julio	65
Aŭgusto	79
Septembro	111
Oktobro	81
Novembro	97
Decembro	66
sen-dataj	41
	822

Atentinda estas la kresko komence de 1926:

januaro	126
februaro	130

Tiuj ĉi ciferoj unuavide eble surprizos la multajn, kiuj — ne havante la eblecon kontroli la aperadon de esp-aj informoj en la gazetoj de la tuta respubliko — erare opinias, ke nenio estas farata en tiu ĉi kampo. Sed kiam ni mem analizas ilin, vidiĝas, ke la sukceso povus esti ankoraŭ pli granda, se estus pli da membroj, kiuj volus dediĉi la fame konatan „unu duonhoron“ semajne al tiu ĉi agado, cetere sufiĉe facila, kiel ni jam multfoje klarigis.

Plej multe helpus, se en la nova komitato unu membro plene sin dediĉus al tiu ĉi propagando gazetara, vigligante for-

gesemajn kunlaborantojn, serĉante novajn kaj estante la centra punkto de ĉiu iniciato.

Ankaŭ estus necese dediĉi pli da zorgo al la fakaj gazetoj Laŭ nia scio, S-ro Ginz publikigis en radio-gazetoj kelkajn informojn, kaj ampleksan artikolon en *Radio-Jarlibro* por jaro 1926. En instruistaj gazetoj zorgis F-ino Šupichová, en poŝtistaj S-ro Nesler, en la medicinaj D-ro Parma.

El la gazetoj de Praha, la plej grandan ciferon atingas *Národní Politika* (35), *Tribuna* 22, *Národní Listy* kaj *Právo Lidu* po 17, *Čech, České Slovo* kaj *Národní Osвобоzení* po 13. La granda ĵurnalo moravia *Lidové Noviny* havas sole 7 informojn, *Ruch* 10, *Moravská Orlice* 9, krome *Nový Lid* 31.

Propagando per paroladoj. Parolanton Asocio sendis en oktobro 1925 al Kolin, kie sekvis kurso kaj klubofondo. -- La teksto de parolado, (verkita de S-ro *Eiselt*) estis sendata al pluraj lokoj dum la tuta jaro, laŭ la detaloj en *Bulteno*.

Ekspozicia materialo Asocia estis plimultigita, administras ĝin zorge S-ro *Šustr* en Praha, kiu sendis ĝin al Klatovy, Nové Zámky, Žamberk, Kolin, Kladno k. a.

La granda parto de la Asocia korespondado konsistis el skribaj informoj laŭ petoj venantaj el la plej diversaj lokoj de la respubliko, precipe tiam, kiam iu gazeto, kiel ekz. *Nový Lid*, *Moravsko-slezský Deník*, *Bratrství*, *Gemer-Malohont* k. a. publikigis adreson de ĈAE. Kiel informilon ni uzas la flugfolion Esperanto — mezinárodní pojítko národů (Esp-o internacia ligilo de la nacioj) kaj *Krátký kurs esperanta* (Mal-longa kurso). Plene elĉerpita estas la flugfolio *Mezinárodní jazyk a autority* (L. i. kaj aŭtoritatuloj), kaj *Zpráva Obchodní komory v Paříži o esperantu* (Raporto de K. Ĉambro Pariza pri esperanto). Estas do necese eldoni progandilojn komercan, instruistan, radian k. a. Ĝuste en tio estas la granda utilo de centra organizaĵo, ke ĝi povas eldoni progandilojn grandkvante kaj per tio malkare, kaj transdoni ilin per fabrika prezo al la kluboj kaj izoluloj, kiuj ilin bezonas por sia agado. Atentu tie ĉi ankaŭ diferencon inter nia Asocio kaj Germana Ligo en ĈSR: tiu ĉi ne bezonas zorgi pri la germanlingvaj progandiloj, ĉar tiajn oni eldonas en Germanio.

Ĉefeĉ. Ankaŭ en 1925 daŭris intereso pri ĉeĥa eldono de Ĉefeĉaj ŝlosiloj. La Pariza komerca konferenco, printempe 1925, rekomendis, ke la ŝlosiloj estu kompletigi-

taj per komercaj terminoj, liverotaj de prof. Cart kaj Kreuz, kaj reeldonitaj tie, kie ili elĉerpigis. Nia ĝen. sekretario estis komisiita zorgi pri la reldono de la ĉeĥa; la komitato traktis pri tio, sed la afero estis prokrastita post sciigo, ke la ĉeĥan Ĉefec intencas eldoni Instituto.

Informaj tabuloj en la stacidomoj, kiujn oni planis fabrikigi unuforme, ne estis eldonitaj, ĉar anstataŭ atendataj 300 mendoj venis sole ĉ. 20. Tiel restas, bedaŭrinde, neuzita la permeso de la fervoja ministerio. Intertempe pluraj kluboj mem fiksigos tiajn tabulojn en sialokaj stacidomoj.

Oficiala instruado.

Lektorato de esperanto en la ĉeĥa politeknika Lernejo en Praha estis definitive starigita, kiel informis nin S-ro *Pitlik*. — Alia lektorato estis starigita en Alta Minista Lernejo en Příbram, lektoro D-ro Ant. *Šilha*.

Laŭ nia peto, la ministerio de instruado decidis nomi ekzamenajn komisarojn por esperanto ĉe ekzamenaj komisionoj en Bratislava.

La siatempa ministeria dekreto, ke esperanto povas esti oficiale instruita kiel nedeviga fako en Komercaj Akademioj, estis profitita nur en unu okazo el 25 eblaj. Sole prof. *Smeták* en *Hradec Králové* instruis en 1924—25: 17 lernantojn, en 1925—26: 16 lernantojn.

En duagrada lernejoj: En *Hradec Králové* instruis en loka gimnazio 32 lernantojn prof. Lukáš.

En unuagrada lernejoj: En *Olomouc*—Neředín S-ro lernestrejo Neuzil 30 lernantojn, en *Nová Paka*, kun permeso de la loka lerneja konsilantaro, instruistino Růžena Křikavová 40 lern. de la burĝa lernejo, en *Slezská Ostrava* S-ro instruisto Macháň 25 lern. de la 1—3 klaso de la loka burĝa lernejo. En *Ústí n./O.* S-ro instruisto Barkman 20 lern. de la burĝa lernejo, sed poste la oficiala permeso estis donita sole por la IV. (lasta) klaso, 5 lern. En *Hora Kutná* S-ro direktoro Horáček en 1924—25: 21 knaboj kaj en 1925—26: 61 lern. de la III. kaj IV. klasoj de la loka burĝa lernejo.

Generale ni devas diri, ke niaj samideanoj, kiuj plejparte opinias, ke esperanto disvastiĝos nur post kiam ĝi estos oficiale enkondukita en la lernejojn, ne sufiĉe eluzis la favorajn dekretojn ekzistantajn en nia lando. Tio eble estas ankaŭ la kaŭzo de

la atentinda fakto, ke kelkaj petantoj renkontis malfacilaĵojn de administra karaktero, kaŭzitaĵn de malfavora inspektoro aŭ referento. Espereble bone utilos ĉi tie la konsilioj donitaj de D-ro Kamaryt en lia artikolo: Oficialaj dekretoj pri instruado de esperanto en lernejoj, publikita ĉeĥe en la 9-a (septembra) n-ro de la Progreso. La petantoj devas precize plenumi la formalizaĵojn, prezenti la peton ĝustatempe kaj zorge eviti ĉion, kio faciligus al la malfavora referento neaprobobon de la instruado.

Plej simpla estas la afero en la Komercaj Akademioj, ĉar tie esperanto estas unu el oficialaj nedevigaj objektoj kaj troviĝas jam en la lernoplano. Oni ne bezonas peti, sed simple la direktoro anoncas la instruadon, se aliĝis al ĝi 20 lernantoj, kiuj lernis jam du jarojn iun romanon (latinidan) lingvon kaj ricevis pri ĝi noton almenaŭ „bona“. La kondiĉo pri romana lingvo estas iom stranga, sed ĝenerale plenumebla. Multon por esperanto povas ankaŭ fari instruistoj de burĝaj lernejoj, ĉar estas ilia devo atentigi pri esperanto, kiam ili en fako „civitana moralo“ parolas pri internaciaj rilatoj, por kiuj la lernoplano mem atentigas pri lingvo internacia esperanto.

Unu grava kaŭzo ekzistas, kial niaj samideanoj-instruistoj ne estas sufiĉe aktivaj: ilia malfacila ekonomia situacio, troŝarĝiteco de la lernantoj kaj de la instruistoj mem.

Rilatoj kun aŭtoritatoj.

Ministerio de la poŝtoj informis nin, ke jam en 1921 ili proponis, ke esperanto estu deklarita kiel klara lingvo telegrafa, sed ke tiam la propono ne estis akceptita. La ministerio ĝin renovigis en decembro 1924, ĈAE laŭ ĝia peto liveris (aŭgusto 1925) memorandumon kun necesaj argumentoj, sed la oficiala delegito de la ministerio en Pariza konferenco de Telegrafa Unio proponis ne nur esperanton, sed ankaŭ idon. Vidante, ke neniu alia ŝtato subtenos lian proponon, li reprenis idon kaj subtenis la hungaran proponon pri sola esperanto, kiu estis poste ankaŭ akceptita. La troa zorgo pri objektiveco kaj progresemo de iuj el niaj oficialaj rondoj preskaŭ estus kaŭzinta agon neobjektivan kaj neprogreseman.

Al la *ministerio de poŝtoj* ni sendis en junio 1924 kaj ripetis en 1925 peton pri enduko de respond-kuponoj en ĈSR. La respondkuponoj estis enkondukitaj de post

1. Oktobro 1925, sed ne estas al ni konate, kian influon havis ĉe tio nia peto.

La *ministerio de instruado* donis al Asocio subvencio de 1000 Kč, pri kies uzo ni devas doni raporton.

La *ministerio de eksterlandaj aferoj* estis petata doni vizrabaton por eksterlandaj vizitantoj de nia III. kongreso en Bratislava. — Plie, laŭ nia peto, la ministerio donis al ni nomaron de la verkoj taŭgaj por esti tradukitaj en fremdajn lingvojn, por ke niaj membroj havu direktilon por traduko en esperanton.

La *ministerio de fervojoj* estis petita doni rabaton por kongresanoj irantaj al Bratislava. Ni esperas ricevi rabaton de 25%.

Foiro Praha post nia demando informis nin, ke „iliaj financaj rimedoj nun ne permesas reklami ankaŭ en esperanto“, sed ke ili uzos niajn servojn, kiam tiu reklamado estos ebla. Dum Printempa Foiro 1926 troviĝos stando de Instituto; ĉe la aranĝo kunlaboros ĈAE kaj Progreso.

Al la asocio de ĉs. gimnastoj-Sokoloj Ĉs. Obec Sokolská ni proponis servojn de esperanto ĉe la okazo de la VIII. Sokola festo en Praha (somero 1926).

Pri rilatoj kun *sciencaj rondoj* parolas la raporto de D-ro Kamaryt pri Scienca Sekcio de ĈAE.

Informado pri ĈSR. per esperanto.

Dum 1925 venis pluraj leteroj el eksterlando, kiuj petis informojn pri plej diversaj aferoj, rilatantaj la kulturen, politikan kaj ekonomian vivon ĉeĥoslovakon.

La plej interesa entrepreno en tiu ĉi fako estis eldono de ĉs. numero de finna gazeto *Otavainen* pere de esp-istoj ĉeĥaj kaj finnaj. Detala informo pri tiu ĉi laboro, kiun sukcese gvidis S-ro Ginz, troviĝas en Progreso, n-ro 4-5, p. 53.

Partopreno de ĈAE en internacia movado

Konstanta Rezentantaro de Naciaj Societoj (K. R.) kunvenis dum 1925 dufoje, printempe en Paris, dum la Parizaj konferencoj, kaj somere en Genève, dum la XVII. kongreso.

En Parizo, ĈAE estis reprezentita de Dro Kamaryt kaj Hromada, en Genevo de Hromada. En K. R. ni akcentis la deziron, ke pure formalaj aferoj baldaŭ estu solvitaj, por ke la kunvenoj de naciaj societoj povu

sin dediĉi al realaj bezonoj, precipe pli intima kunlaborado de naciaj societoj. Ĉiujn decidojn de ambaŭ kunvenoj, ĈAE poste skribe konfirmis.

Komerca Adresaro al kiu ĈAE kune kun GEL, kolektis la materialon en tri monatoj, ĝis nun ne efektiviĝis internacie. La detala budĝeto, starigita de UEA, vidigas grandan monbezonojn, dum ke la mono enspezebla estas negranda. Eble oni povus pripensi, ĉu ĈAE kaj GEL eldonu la adresojn el ĈSR. Ilia disvastigo ekster la landlimojn certe kaŭzus kreskon de esperantaj korespondadoj venantaj al ĈSR el eksterlando, kaj faciligus nian propagandon en komercaj rondoj.

La XVII. kongreso en Genève. Por Ĉeĥoj salutis la kongreson S-ro Neužil el Olomouc, inter vicprezidantoj kongresaj estis elektita nia ĝen. sekr.

Oficejo de ĈAE.

Dum la jaro 1925 ni ofte informis niajn membrojn pere de Bulteno pri malfacilaĵoj, kiujn kaŭzas al ĈAE manko de pagata oficisto. Ni faris tri provojn, el kiuj plej bone sukcesis tiu kun S-ro Echtner, de aŭgusto ĝis 30. Oktobro. La korespondadoj venantaj al ĈAE estas apenaŭ prilaboreblaj, absolute mankas tempo por pli intensa iniciata laboro. Por la venonta jaro montriĝas necese 1) aŭ trovi samideanon kapablan maŝinskribi kaj esperante stenografi, aŭ 2) elekti en la komitatojn personojn, kiuj dividus kun la ĝen. sekretario la manlaborojn oficejajn.

La ciferoj montrantaj la nombron de alvenintaj poŝtaĵoj en ĉiu monate aparte estas: 94, 126, 158, 122, 63, 90, 68, 117, 125, 155, 96 kaj 105.

Forsenditaj korespondadoj (sen cirkuleroj): 106, 201, 99, 97, 58, 54, 59, 101, 94, 192, 156, 76.

Entute venis 1319, foriris 1293 poŝtaĵoj.

Oni ne forgesu, ke la ĝen. sekretario redaktas kaj administras ankoraŭ la Progreso, kies korespondado estas eĉ iom pli granda, ol la ciferoj ĵus cititaj. El tio rezultas, ke unu persono nepre ne povas prizorgi ĉion kaj ke divido de laboro asocia estas absolute necesa.

Ni esperu, ke tio okazos kaj ke en 1926 ni povos plene profitigi la diversajn favorajn cirkonstancojn kaj forigi la kelkajn malfavorajn.

(Fino)

BIBLIOGRAFIO

KVIN NOVAJ LIBROJ ESPERANTAJ ELDONITAJ EN ĈSR.

(Fino.)

La libroj de Supichová faros do bonan servon al ĉeĥaj samideanoj. Multaj deziris, ke oni eldonu tiajn librojn. Jen ili estas, vi do aĉetadu ilin. La prezoj: Lernolibro 9'60, konversacio 9'60 kaj legolibro 16 Kč tion ebligas eĉ al la neriĉaj.

Se la unuaj tri libroj prezentas semadon, la kvara kaj la kvina estas rikolto. Moravia diligenta samideano tradukis, aro da amikoj kunhelpis kaj eldonis sub kolektiva nomo Moraviaj pioniroj la tutmonde konatan libron de *Karel Čapek: RŮR (Rossumaj Universal-Robotoj)*. Kolektiva dramo je enkonduka komedio kaj 3 aktoj. 109 p. 15×21 cm. Prezo 13 Kč. Aldonita artikolo pri K. Čapek de Otto F. Babler. Bela tipografia aranĝo. Plaĉa kovrilo, sed neniel vidiganta, ke temas pri esperanta traduko.

Post kelke da jaroj nova traduko el ĉeĥa literaturo, fakto tiom pli ĝojiga, ke la traduko estas tre flua, preskaŭ ĉie fidele reflektanta la vivoplenan dialogon, precipe en la antaŭludo.

Por konigi la interesan temon de la dramo ni publikigas artikolon de ĉeĥa kritikisto Rutte, v. p. 31. de tiu ĉi n-ro. En la traduko mem ni ne trovas gravajn erarojn. Detala preparo montrus nur lokojn, kie ni pli ŝatus alian esprimon. Anst.: „perspektivo je senfinajn vicojn de konstruaĵoj“ pli simpla estas „perspektivo al...“. „Aĵ uvidite...“ iam estas tradukebla per „ĝis...“, sed sur p. 19. simpla „kiam vi vidos“ estas necesa por ne ŝanĝi la sencon. Ĝusta vorto estas „procento“ ne procento. „Vivantaj maŝinoj“ ne „vivaj m.“, p. 29. Sur p. 68, linio 11. ni dirus: Vi devis aŭskulti. Spite zorga korektado restis kelkaj preseraroj. Korektu: kiamaniere (p. 32), inkluzive (34), tiun en la biblioteko (35). kunveni (47), iufoje (69).

La tradukintoj ĝuste uzis la vorton *roboto*, ĉar neniu alia vorto taŭgas por esprimi la estaĵojn kiuj „ne estas homoj, estas mekanike pli perfektaj ol ni, posedas miregindan intelektan kapablecon, sed ne havas animon.“ En la titolo povis esti konservita la vortludo kaj anst. Rossum (simila al ĉeĥa rozum, racio) povis esti Rasion aŭ pli bone, Racion U. R.

Interesan verketon eldonis S-ro Albin Neuzil, lernejestro en Olomouc-Neředín: *Metodo de la manpresitaj ornamaĵoj*. I. parto. Prezo 2'50 sv. fr. (20 Kč).

Sur kvar paĝoj, 21×26 cm la aŭtoro klarigas sian interesan metodon, laŭ kiu liaj lernantoj preparas salikajn kaj sambukajn branĉetojn kaj uzas ilin por mane presi diverskolorajn ornamentojn kaj aliajn ornamaĵojn, kies specimenoj troviĝas sur 9 plaĉaj diverskoloraj tabeloj. (Anst. komode ni uzas oportune.) — Ni rekomendas tiun ĉi verketon al ĉiuj instruistoj en-kaj eksterlandaj. Rud. *Hromada*.

Kliĉ jazyka mezinárodního Esperanto. IV. eldono de Slosilo de Ĉefeĉ, por Ĉeĥoj. Eldonis Ĉs. Esp. Instituto, Praha-II., Křemencová 17. Korekta represo de antaŭmilitaj eldonoj, kun nuntempaj informoj pri la movado sur kovrilo. Prezo 60 hel., 100 ekz. 50 Kč. Ĉiu esperantisto devus aĉeti certan kvanton de tiu ĉi praktika propagandilo.

Jidelní lístek v pěti řečech (česky, německy, esperantsky, maďarsky a francouzsky), 4 str. letáček, 11×16 cm, vydal Rud. Friedrich, ředitel gymnasia v Král. Poli. Obsahuje na 100 výrazů. Esp. výraz pro „šunku“ jest opraviti na „šinko“. Cena 10 ekz. 4 Kč, 50 ekz. 15 Kč. Objednejte přímo u vydavatele.

Esperantský zpravodaj, který vycházel roku 1920—1923 v Praze redakci odb. uč. J. Šupichove, měl by si přečísti každý, kdo se zajímá o jazyk mezinárodní. I. roč. rozebrán. Ročníky II. a III. žádejte (po 5 Kč místo 10 Kč) na adr. Esp. zpravodaj, Praha-II. 2032.

Ledo-Industrio. Al ĉiuj, kiuj estas iel ajn interesataj pri ledo kaj ledo-industrio, ni rekomendas la francan revuon *L'Indès des industries de cuir*, trionjara revuo, kies lasta numero enhavas artikolon pri esp-o, redaktitan de S-ro Baudet, Vicprezidanto de la Pariza Komerca Ĉambro. Adr. Paris, 54, rue de Bondy.

AMUZENIGMOJ

Solvaj el No 6-7: 5. forko, mi, for-mi-ko; 6. m, n; 7. Fi-ŝo; 8. LVX.

Prof. Al. Mazzolini, Fano (It.)

9. Aĵ portanta premion

En akcidento de Aŭstri' l' unua, en mezo de provinc' hispana kun ĉefurbo Oviedo jen la dua; en oriento de siriaj montoj famaj pro siaj cedroj estas la finaĵo; al la terkulturisto rekompenco alportas la tutajo.

10. De kaptato kaptanto

Ekzistas du bestetoj destinataj l' unua kaptat' esti, kaptanto la alia; la nomon de l' unua vi faru el dekkvar alumetoj, kaj poste forĵetinte nur unu alumeton la nomon de l' kaptato vi forigas por aperigi tiun de kaptanto.

11. Matematika paradokso

Kiel tuto valoras unu malpli ol nulo?

12. Deklitera enigmo

Kun *a* esprimas mezuron, kvanton, kun *e* posedon, komencan punkton, kaŭzon, aŭtoron de ag', kvaliton, kun *i* neniu superas Ĝin, kun *o* konkludas, kun *u* radiko de la duoblo sia ĝi estas.

13. Eŭropa ĉefurbo

Leganta moŝto, kiel *vi en rondajo* iĝas urbeĝo de Eŭropo?

MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Laŭ informoj ricevataj de Ĉs. Asocio Esp.

NOVAJ KURSOJ

Kolín. Novan kurson por 22 personoj gvidas S-ro Ĉerný.

Jičín. Kurson por 15 p. gvidis de novembro ĝis fino de januaro S-ro Kudrna.

Esperanto kaj Blinduloj. En la Instituto de Klár okazas 6 kursoj de esperanto por Ĉeĥoj kaj Germanoj kun entute 41 p. Instruas f-inoj Barešová, Igel, Nývltová, Reitmajerová, s-ro Echtner.

En la Instituto de Hradčany oni instruas esperanton oficiale en la kvara klaso de la blindula lernejo. Instruas S. M. Aquina (monahino).

La redakcio de „Aŭroro“ eldonis Braille-presan memorlibron pri Majstro K. Em. Macan.

PUBLIKAJ PAROLADOJ

Plzeň. Tri komercistaj societoj kun klubo de altlernejaj studentoj, kaj kun E. Klubo aranĝis la 18/3. paroladon de S-ro Gross pri la nuna distingiĝo kaj uziĝo de espo en komerco.

LOKAJ RAPORTOJ

Jičín. Klubo havas 16 p. Prez.: S-ino Najmanová, Sekr.: Fr. Kudrna, Kas.: J. Pulter. Kunvenoj ĉiumerkrede en Ŝtudenta domo. El kluba mono oni abonas Heroldo. 5 UEA-anoj. En loka gazeto Jičínský obzor de tempo al tempo aperas novaĵoj pri esp-o laŭ ĉeĥaj tekstoj por gazetara servo en La Progreso.

Olomouc. En la jarkunveno, la 7. Marto, la jena komitato estis elektita: Kudela pr., Mattel vpr., Hochmann sek., Štěrba kas., Mastný, Neuzil kaj Wolf komit. S-ro Rebiček, fervoja inspektoro kaj Mastný, ŝufabrikanto, estis elektitaj kiel honoraj membroj. Sialn mortintajn membrojn la Societo honoros per aĉeto de libroj kun enskribota taŭga dediĉa teksto. Libroj estos akceptitaj en la urban publikan bibliotekon, esperanta fako. — La 11/4. okazos en YMCA datrevena festo de Zamenhof. La ĉefan parton de la programo prizorgos la membroj de oficiala kurso ĉe la fervoja direkcio, gvidata de S-ro Malik el Přerov. La Societo aĉetis 2 akciojn de Radio-Genève.

Plzeň. Esp. Klubo reelektis en sia jarkunveno (okazinta la?) Inĝ. R. Novák kiel prez., S-ron Pavlík kiel vicprez. Nova sekretario estas S-ro Karel Melichar.

Nové Zámky. Dum Sokola karnavalo, je la notkomezo, kiam la maskoj malaperis de la vizaĝoj, mallumiĝis subite, sed ĉarma ruĝeta lumo distingiĝis tra la salono. Kvar junaj viroj enportis sur siaj ŝultroj grandegan terglobon, kun verda stelo de Esperanto. Simfonia orkestro ekludis, bruo de la ĉeestantaro silentiĝis kaj grupo de 10—12 gejunuloj, starantaj ĉirkaŭ la globo, piece, kredeme, entuziasme ekkantis la himnon de esperanto. Kune staris malgranda grupo de Ĉeĥoj, Slovakoj, Hungaroj, Germanoj, kristanoj, hebreoj, trovinta unu komunan voĉon, senton, komunan idealon . . . (Eltiraĵo el la loka gazeto, priskribanta la interesan scenon, per kiu la viglaj lokaj esperantistoj sukcesis altiri la atenton de la publiko al nia afero.)

O NÁS A PRO NÁS

Úvodem: Smi československá esperantistka také myslit? Totiž — veřejně myslit? Kdysi — kdesi — je tomu již velmi dávno, bylo kýmisi napsáno a vytištěno doslovně: Malbelaj naivaj fraŭlinoj neniaj mankas (v krajinských schůzích totiž) . . .

Nu, přiznávám se upřímně, velmi se mi nelíbil ten výrok, ale zamyslela jsem se nad ním často a později posuzovala jej jinak, ale docela jinak. A teď tedy — dovoli-li vážná redakce — vám jedna z těch „malbelaj“ (to jsem rozhodně!) poví, co si tak někdy myslí . . .

Bude-li to „naiva“, nezlobte se na mne, ale na pana redaktora, který mi tu popřál místa.

* * *

Myslím si, myslím, že bychom my, čeští esperantisté, přece jenom měli se do prázdnin sejit v sídle našeho ústředního Svazu a svou účastí podepřít akci pražských spolubojovníků, neboť, věřte, čeká je tuhá propagační práce v Praze. Či myslíte, že všichni našiinci pojedou do Bratislavy?

Co to píšete? Honem ujišťuji bratislavské Lo Ko Ko, že nemíním dělat náladu proti našemu státnímu sjezdu, ne, stokrát ne, zdar jemu a jeho snaživým pracovníkům, sama se už tam chystám, ale . . . Vidíte, jak naivně rozvádím dobrou myšlenku. Ano, zdála se mi dobrá, ale teď si myslím, že mě nepochopíte . .

* * *

Tak prý (bohužel, já tam nebyla) na valné hromadě našeho Svazu mluvilo se o paláci Svazu a dokonce o správci domu. Slyšte! Jen maličkost — peníze — a náš obětavý pan generální sekretář bude se svými akty (kolik ten jich asi už má!) ve svém. Jako venkovanka neznám pražských potíží, ale Marden napsal: „Co chci, to mohu!“ Zkusme to všichni říkat a nahlas a v čísle množném! Bylo by to s každé stránky výborné. Vzpomínám si teď, že do války měla nebožka Unie takový pokojíček ve Vodičkově ulici a po převratu, že v kavárně Unionce, (zdá se mi, že dosud mají tam nadpis s hvězdou, či jste jej už, Pražáci, sundali?) byla jakási informační stála esperantská kancelář, již řídila sl. učitelka Moudrá. Jistě, náš Svaz a Progreso spojí se pokojíčkem, no a já budu první, která se tam o té manirestační schůzi v létě půjde

poklonit tě slečně či raději panu sekretáři, co se tak pěkně vyzná v esperantském těsnopise. Aspoň pak nebudu musit běhat a jezdit z jedné ulice do druhé, když sháním v pražském knihkupectví nějaký ten slovník anebo tu novou Konversaci Šupichové.

* * *

Už tedy dost. Jenom si ještě myslívám, proč straší v Praze nápis „Čehoslovaka GAZETO“ proti Denisovu nádraží?

* * *

Pražští samideáni a samideánky (teď nevim dobře, je-li to slovo samideán správně takto zčeštěně či nikoliv; škoda, že nevychází Bouškova Škola Esperanta, ta výborná nás jazykových hříšníků učitelka, hned bych poslala její redakci uctivý dotaz), nehněvejte se, že tolik piší o vás, já na vás často vzpomínám a dovoli-li trpělivý pan redaktor, povím vám příště něco o tom, co si také myslím o nás, venkovských sam-ide-ánech.

Esperantistka.

DIVERSAĴOJ

— **Fervoĵistoj** inter ĉs. esperantistoj estas laŭdire multaj. Ĉu neniŭ el ili legis nian noton sur la 12. p. de la 1.-an n-ro? Ĉu neniŭ el ili havas momenton liberan por okupi sin per ĉeĥaj tradukoj de fervoĵaj terminoj esperantaj? Ni ne estas fakuloj fervoĵistaj, sed tre volonte helpos al tiu entrepreno almenaŭ per interrilatigo de la kunlaborantoj. Refoje ni vokas: Skribu al ni!

— **Muzikistoj**, muzikamantoj inter ĉs. esperantistoj estis atentigitaj en la 10.-a n-ro (p. 116) pri tre konvena bazo por ĉeĥo-esp-a vortareto de muzikaj kaj muzikilaj terminoj. Ankaŭ al tiu ĉi laboro eĉ ne unu persono anonciĝis. Kaj tamen plejparte sufiĉus eltrovi el la ĝeneralaj vortaroj la respektivajn fakajn terminojn. Ĉu iu samideano faros tion?

Fondo de biblioteko de sciencaj verkoj en esp. Por pli facile propagandi en la sciencaj kaj teknikaj rondoj la Internacia Scienca Asocio Esperantista bezonas posedi specialan bibliotekon, konsistantan el ĉiuj libroj kaj broŝuroj jam eldonitaj en esperanto pri iu scienca aŭ teknika temo; tial ĝi alvokas ĉiun, kaj speciele la eldonistojn de esperantaj verkoj, ke ili kolektu la tiaspacajn dokumentojn, kaj ilin sendu al la ĝenerala sekretario de Scienca Asocio S-ro Rollet de l' Isle, 35 Rue du Sommerard, Paris.

La Scienca Asocio danke ilin ricevos, kaj repagos la sendelspezojn al ĉiu malavara donacinto.

Pri pagotaj libroj faru proponojn al la ĝenerala sekretario, kiu akurate respondos, ĉu la verko mankas aŭ ne en la jam ekzistanta dokumentaro.

O. S.

Z ESPERANTSKÉHO SVĚTA

DVĚ CESTY SVĚTOVÉ ŘEČI.

(Napsal Dr. Edmond Privat.)

Kdo pozoruje nestranně světové hnutí pro mezinárodní pomocný jazyk, může se přesvědčiti, že jest rozděleno na dvě skupiny, které jdou různými cestami: Jedni sní o nějaké mocné komisi mezistátní nebo nad státy, která prozkoumá konečně všechny myšlenky nebo návrhy a vydá nějaké rozhodnutí. Druzí pochybují, že taková komise někdy přijde a rozšiřují, aby neztráceli času, již nyní ve světě praktický pomocný jazyk, jenž sám se obohacuje a vyvíjí svým vlastním užíváním.

Krátce řečeno, možno nazvat, ačkoliv ne zcela přesně, první cestu cestou teoretickou a cestu druhou cestou praktickou. Která z obou skupin má pravdu a která jest silnější?

O síle v číslicích nemůže býti pochyby. Praktické t. j. esperantistické představují devět desetin veškerého hnutí pro mezinárodní jazyk a esperanto jest mnohem více známo ve světě nejen než všechny ostatní systémy dohromady, nýbrž dokonce i více než sama myšlenka mezinárodního jazyka.

A nyní o tom, kdo má pravdu. Oněch devět desetin pracuje pilně, aby uvedlo ihned přímo v užívání to, co navrhuje. Krok za krokem zavádějí esperanto do různých oborů a postupně se vyvíjí tato řeč, jež byla s počátku vlastně jen slovníčkem a nepatrnou mluvnici, stále bohatěji a živěji, jsouc uhlažována zkušeností. Po mnoha letech neúnavně a stále pîle může se státi užívání esperanta všeobecným a otázka světového jazyka bude rozluštěna přirozeně a beze všech zázraků až na zázrak trpělivosti a nadání. Pamatujte slov Viktora Hugo: Nadání jest dlouhá trpělivost.

Kdyby se tedy teoretické, ona zbývající desetina, mylila, a kdyby nikdy nepřišla vytoužená komise, byla by věc přece zachráněna a cíle bylo by dosaženo vykonanou dlouhou cestou.

Nyní se pokusme věřit, že mají pravdu teoretické a že jednou přijde ona slavná komise. Zněmožní to praktické svou dosavadní práci? Zajisté nikoliv, ba oni budou hlavním podnětem k rozhodnutí této komise. Praktické, ať chtějí nebo nechtějí, pracují zcela zdarma ve prospěch teoretiků všim, cokoliv čini: Opatřují jim jazykový materiál k rozboru, diskusi a kritice, dávají jim svou zkušenost k pozorování a ukazují jim svůj život, aby se z něho učili. Především přinášejí světu důkaz, že pomocný světový jazyk může dobře fungovati.

Kdyby oni, esperantisté, přestali pracovati, mohli by ostatní, totiž teoretické, ihned zavřítí krám. Myšlenka světového jazyka by neměla pevného základu bez praktiků.

A nyní o teoreticích. Jak se sluší, jsou rozděleni na mnoho oddílů: Jedni se zabývají reformami esperanta, druzí navrhováním nových systémů a zbytek studiem a porovnáváním jich všech. Mají-li pravdu co se týče komise, pak jí dodají velmi různobarevný materiál, který sice budi poněkud závrat nedostatkem jednotnosti v závěrech, ale jest sám o sobě velmi zajímavý.

Nemají-li však pravdu a neprijde-li nikdy ona komise, budou míti pocit jako oni praktické, že

v každém případě pomáhali myšlence světové řeči a že usnadnili cestu celé věci? Všichni si nebudou moci tak říci. Zatím co esperantisté slouží myšlence svou denní prací, překáží jim v tom několik teoretiků, kteří se zaměstnávají jediné tarasením cesty praktikům. Zcela zatarasí cestu ovšem nemohou, ani ne značně, ale znepríjemňují práci a zpomalují ji. Esperanto jde však přece stále silněji ku předu. Někteří z teoretiků na ně nežárlí. Pokračují slušným způsobem ve svých oddělených studiích a zachovávajíce při tom vědeckých method, nekladou praktikům v cestu překážky.

Proč tak čini? Cítí sami, že ona komise jest jen věci touženou. Jest možno, že k ní dojde, možno také, že ne . . . spíše však ne. Proto jest třeba, aby nebyla poškozena věc jistá pro něco nejistého.

Přel. O. G.

Esperantská konference v Locarnu. Mezinárodní ústřední výbor esperantský svolává na velikonocce od 3. do 6. dubna konferenci všech státních organizací esperantských a zemských zástupců Světového svazu do Locarna k sjednání další metodické spolupráce. Konference, jež se bude konati ve stejné místnosti, kde byla uzavřena locarnská smlouva, přispěje značně k uskutečnění cílů této smlouvy. Teprve přímým dorozuměním, o něž se snaží esperantisté, může dojiti k pravému přátelství mezi národy.

Painlévé a esperanto. Francouzský politik Painlévé, člen Akademie věd, jenž vyslovil již opětovně své sympatie k esperantu, vstoupil do výboru Esperantského vědeckého svazu mezinár.

Esperanto ve školách Jugoslavie. Ministr Radič prohlásil delegaci jugoslávských esperantských organizací, že hodlá v příštím školním roku jmenovati esperanto povinným vyučovacím předmětem pro všechny obchodní školy Jugoslavie a že pomýšlí též na zavedení tohoto jazyka do ostatních škol celé země.

Esperantsky uzavřený sňatek. Koncem února t. r. slavil ve Vídni svatbu význačný esperantský pracovník Smital s dr. Lianou Domokos. Církevní výkon provedl P. Nedwid, prior škotských mnichů ve Vídni a předseda Ligy katolických esperantistů rakouských, jemuž asistoval P. Mestan, provinciál řádu Piaristů a člen státní zkušební komise esperantské. Pro přítomné bylo překvapením, když P. Nedwid užil pro celý výkon mimo několika předepsaných slov latinských a německých jen esperanta.

Němečtí technické svazy pro esperanto. Německé sdružení technických svazů, ke kterému náleží důležité odborné korporace, má živý zájem o esperanto. K poslednímu světovému kongresu esperantskému vyslalo toto sdružení svého ředitele, aby jednal o možnosti společné práce a letos přináší již oficiální jeho časopis esperantské resumé jednotlivých svých částí. Sdružení se snaží pomocí esperanta nabýti nových styků se zahraničím.

Vědecká knihovna esperantská. Organizace pro použití esperanta ve vědách se sídlem v Paříži zřizuje pro své účely knihovnu esperantských děl o vědeckých předmětech všech oborů. Knihovna obdržela již z mnoha stran vzácné rozebrané esperantské spisy a velká vydavatelství v různých zemích dají tam své edice. Biblioteka bude novým dokladem mohutnosti esperantského hnutí.

Opatřme Vám následující knihy:

Fundamento eldono, 5 lingva . . .	Kê	6-
Fundamento, kun ĉeĥa trad. . .	"	3-
Fundamenta Krestomatio . . .	"	20-
Fabeloj de Andersen . . .	"	12-
Georgo Dandin . . .	"	6-
Hamleto, Shakespeare, 170 str. . .	"	10-
Ifigenio, Goethe, 108 str. . .	"	12-
Proverbaro esperanta, 82 str. . .	"	10-
Rabistoj, Schiller, 144 str. . .	"	12-
Revizoro, Gogol, 100 str. . .	"	12-
Rabeno de Baharah . . .	"	8-
Marta . . .	"	20-
Eliro, Levidojpo . . .	"	6-
Sentencoj de Salomono . . .	"	4-
Predikanto . . .	"	2-
Lingvaj respondoj . . .	"	10-
Faraono, Bol. Prus, 3 sv. 600 str. . .	"	38-
Pola Antologio, krátké povídky . . .	"	6-
Halka, opera, text . . .	"	4-
Interrompita kanto . . .	"	3-
Makbeto, Shakespeare . . .	"	8-
Mazepa, Slowacki, tr. Grabowski . . .	"	6-
Imenlago, novelo de Storm, 34 str. . .	"	3-
Kaatje, el la flandra 111 str. . .	"	8-
Fatala ŝuldo, teosofický román 318 str. . .	"	10-
Reĝo Judea . . .	"	18-
Monadologio de Leibniz 31 str. . .	"	2-
Vortfarado, de Ĉefeĉ . . .	"	4-
Vortaro de oficialaj radikoj de Cart, 32 str. . .	"	1:50
Klasika libro de esp-o, 120 p . . .	"	5-
Bulgara lando . . .	"	12-
Bulgara Antologio . . .	"	30-
Kataluna Antologio . . .	"	70-
Rakontoj de Arbes, 135 str. . .	"	6-
R. U. R. Ĉapek . . .	"	13-
Ĉeĥa literaturo. Dr. Novák Arne . . .	"	8-
Vade-Mecum de Int. Farmacio, Rousseau, 228 p. . .	"	24-
La Esperantisto en Germanio . . .	"	20-
Moravia karsto . . .	"	5-
Titl: Vortaro esp. ĉeĥa v. . .	"	7-
Kühnl-Procházka: Slovník češko-esp. . .	"	18-
Čánský-Riedl: Slovník esp.- češský . . .	"	20-
Kabe: Enciklopedia vortaro, 175, v. . .	"	18-
Boirac: Plena vortaro esp. 3 sv. . .	"	38-
Wüster: Maŝinfaka vortaro . . .	"	15-
Bednář: Učebnice esperanta . . .	"	12-
Kamaryt: Jazyk mezinárodní . . .	"	8-
Kotzin: Na obranu esperanta . . .	"	3-
Šupichová: Učebnice esp. . .	"	9:60
" Knih konversace . . .	"	9:60
" Legu kaj parolu . . .	"	16-
Žďárský: Učebnice esp. . .	"	20-
Bouška: Škola esperanta, úplná . . .	"	30-

Obstaráme za předem zasláný obnos.
Žádejte složenku.

LA PROGRESO, Praha VII., Sochařská 333.